

## „ETA APOKRIFO“

La haŭto de miaj vizaĝo kaj manoj estis brulvundita. Mi rememoris, ke serĉante dormigilon por Harey (nun mi ridus pro mia naiveco, se mi povus), en la sukurkesto mi rimarkis bokalon da kontraŭbrula pomado, do mi iris al mia kajuto. Mi malfermis la pordon kaj en la ruĝa lumo de la sunsubiro mi vidis, ke en la brakseĝo, ĉe kiu antaŭe genuis Harey, iu sidas. Timo paralizis min, panike mi retroiris por ĵetiĝi fuĝe; tio daŭris sekunderon. La sidanto levis la kapon. Estis Snaut. Kruron sur kruro, dorsdirekte al mi (li plu surhavis la saman tolan pantalonon, bruligitan per kemiaĵoj) li trarigardis iujn paperojn. Stako da ili kuŝis apude sur tableto. Rimarkinte min, li lasis tion kaj dum momento observis min, malserena, super la okulvitroj ŝovitaj ĝis la nazopinto.

Senvorte mi aliris la lavabon, prenis la duonlikvan pomadon el la sukurkesto kaj komencis ŝmiri per ĝi la plej vunditajn lokojn sur la frunto kaj la vangoj. Feliĉe mi tro ŝvelis kaj la okuloj, danke al forta kunpremo de la palpebroj, saviĝis. Kelkajn grandajn vezikojn sur la tempioj kaj la vango mi pikis per sterila nadlo kaj elpremis la seraĵon. Poste mi algluis du pecojn de malsekigita gazo al la vizaĝo. La tutan tempon Snaut atente observis min. Mi ignoris tion. Kiam mi finis la procedon (la vizaĝo bruldoloris ĉiam pli),

mi eksidis en la unua fotelo. Antaŭe necesis formeti el ĝi la robon de Harey. Temis pri tute ordinara robo, krom la afero pri neekzistanta zipo.

Snaut, kun la manoj kuŝantaj sur la pinta genuo, kritike sekvis miajn movojn.

– Nu, ĉu ni babilu? – li ekparolis, kiam mi sidiĝis.

Mi ne respondis, alpremante la gazon, kiu komencis deŝoviĝi de mia vango.

– Ni havis gastojn, ĉu?

– Jes – mi respondis seke. Neniom mi deziris alĝustigi min al lia tono.

– Kaj ni liberiĝis de ili, ĉu? Nu, nu, vi impete aliris la taskon.

Li tuŝis la fruntan haŭton, kiu daŭre skvamiĝis. Sub ĝi aperis rozkoloraj makuloj de freŝa epidermo. Mi gapis al ili stultiĝinta. Kial ĝis nun la tiel nomata sunbruno de Snaut kaj Sartorius ne pensigis min? La tutan tempon mi kredis, ke tio estas pro suno – sed neniu prenas sunbanon sur Solaris...

– Sed vi komencis sufiĉe modeste? – li parolis sen atenti la subitan fulmon de kompreno en miaj okuloj. – Diversaj narkotaĵoj, venenoj, liberstila lukto – ĉu?

– Kion vi celas? Ni povas paroli kiel egaluloj. Se vi volas klaŭni, prefere iru for.

– Foje oni klaŭnas kontraŭvole – li diris. Al mi li levis la duonfermitajn okulojn.

– Ne provu konvinki min, ke vi ne uzis ŝnuron aŭ martelon. Do eble vi ĵetis inkujon kiel Lutero? Ne? Ej – li grimacis – vi estas vera bravulo! Eĉ la lavabo ne estas rompita, vi ne provis eĉ frakasi la kapon, nenio, la ĉambron vi ne ruinigis, nur tuj-tuj, rap! rap! – pakis, pafis kaj kvite?!

Li rigardis la horloĝon.

- Do, ni havas du, eble eĉ tri horojn - li finis. Li rigardis min, gapis kun malplaĉa rideto, kaj fine diris:

- Do vi diras, ke vi trovas min porko?

- Kompleta porko - mi forte jesis.

- Ĉu? Kaj ĉu vi kredus, se mi dirus al vi? Kredus almenaŭ unu vorton?

Mi silentis.

- Unue tio okazis al Gibarian - li daŭrigis kun same falsa rideto. - Li fermiĝis en sia kajuto kaj parolis nur tra la pordo. Kaj ni - ĉu vi divenas, kion ni verdiktis?

Mi sciis, sed preferis silenti.

- Jes ja. Ni konkludis, ke li freneziĝis. Iom-tiom li diris al ni tra la pordo, sed ne ĉion. Eble vi eĉ konjektas kial li ne malkaŝis sian gaston? Nu, vi jam scias: *suum cuique*. Sed li estis vera esploristo. Li postulis, ke ni donu al li ŝancon.

- Kian ŝancon?

- Nu, li provis, mi supozas, iel klasifiki tion, kompreni, decidi, li laboris nokte. Ĉu vi scias kion li faris? Vi certe scias!

- Tiuj kalkuloj - mi diris. - En tirkesto. En la radiostacio. Ĉu li?

- Jes. Sed tiam mi ankoraŭ ne sciis tion.

- Kiom longe tio daŭris?

- La gastigado? Ŝajne semajnon. Interparoloj tra pordo. Ho, kio okazis tie. Ni pensis, ke li haluciniĝis kaj estas motore stimulita. Mi donis al li skopolaminon.

- Sed... al li?!

- Jes ja. Li prenis, sed ne por si. Li eksperimentis. Tiel ruliĝis la aferoj.

- Kaj vi du...?  
- Ni? En la tria tago ni decidis eniri lian ĉambron, elrompi la pordon, se ne eblos alie, pro respekto ni volis kuraci lin.  
- Ho... do tial! - mi nenecese elkriis.  
- Jes.  
- Kaj tie... en la ŝranko...  
- Jes, kara knabo. Jes. Li ne sciis, ke ĉi-foje ankaŭ nin vizitis gastoj. Kaj ni ne plu povis zorgi pri li. Sed tion li ne sciis. Nun tio... tio estas siaspeca... rutino.

Li diris tiel mallaŭte, ke la lastan vorton mi pli ĝuste divenis ol aŭdis.

- Momenton, mi ne komprenas - mi diris. - Kiel do, vi devis aŭdi. Ja vi diris, ke vi ambaŭ kaŝaŭskultis, tial necesis aŭdi du voĉojn...

- Ne. Nur lian voĉon; eĉ se estis tie malklaraj flustroj, vi certe komprenas, ke ĉion ni kredis veni de li...

- Nur de li...? Sed... kial?

- Mi ne scias. Mi havas, fakte, unu teorion pri tio. Sed mi kredas, ke ne valoras hasti kun ĝi, des pli, ke klarigante ion ĝi ne helpas. Jes. Sed vi devis vidi ion jam hieraŭ, alie vi kredus nin ambaŭ frenezuloj, ĉu ne?

- Mi pensis, ke mi mem freneziĝis.

- Aĥ, ĉu? Kaj neniun vi vidis?

- Mi vidis.

- Kiun?!

Lia grimaco ne plu estis rideto. Mi longe observis lin, antaŭ ol respondi:

- Tiun... nigran...

Li ne ekparolis, sed lia tuta kuntiriĝinta, antaŭen klinita korpo iom malstreĉiĝis.

- Vi povis averti min – mi komencis sen antaŭa certo.
- Ja mi avertis.
- En kia maniero!
- En la sola ebla. Komprenu, mi ne sciis KIU venos! Ne-niu sciis, ne eblas tion sci...
- Aŭskultu, Snaut, jen kelkaj demandoj. Vi konas tion... de kelka tempo. Ĉu ŝi... ĝi... kio okazos al ŝi?
- Vi celas demandi – ĉu ŝi revenos?
- Jes.
- Revenos kaj ne revenos.
- Kion signifas tio?
- Ŝi revenos sama, kiel komence... de la unua vizito. Simple ŝi scios nenion aŭ, pli precize, kondutos, kvazaŭ ĉio, kion vi faris por liberiĝi je ŝi, neniam estus okazinta. Se vi ne devigos ŝin per situacio, ŝi ne estos agresema.
- Kia situacio?
- Tio dependas de la cirkonstancoj.
- Snaut!
- Kion vi volas?
- Ni ne estas pagipovaj por la lukso de sekretoj!
- Tio ne estas lukso – li rompis seke. – Kelvin, al mi ŝajnas, ke vi plu ne komprenas... aŭ, atendu!
- Liaj okuloj ekbrilis.
- Ĉu vi povas diri KIU estis ĉi tie?!
- Mi pene englutis salivon, mallevis la kapon, ne volis rigardi al li. Mi preferis vidi iun ajn, sed ne lin. Tamen mi ne havis elekton. Gazo-peco degluiĝis kaj falis sur la manon. Mi ekstremis pro la humida tuŝo.
- Virino, kiun...
- Mi ne finis.

- Ŝi mortigis sin. Faris al si... injektis...

Li atendis.

- Ĉu sin mortigis...? - li demandis vidante mian silenton.

- Jes.

- Ĉu ĉio?

Mi silentis.

- Tio ne povas esti ĉio...

Rapide mi levis la kapon. Li ne rigardis min.

- De kie vi scias?

Li ne respondis.

- Bone - mi diris. Mi lekis la lipojn. - Ni kverelis. Aŭ fakte ne. Estis mi, kiu diris al ŝi, vi scias, kiel oni diras en kolero. Mi prenis miajn aĵojn kaj elloĝiĝis, ŝi komprenigis al mi, ne diris tion rekte, sed se oni dum jaroj vivas kun iu, tio ne estas necesa... Mi estis certa, ke ŝi nur babilas - ke ŝi timus fari tion, kaj... ankaŭ pri tio mi diris al ŝi. En la sekva tago mi rememoris, ke en tirkesto mi lasis tiujn... injektaĵojn; ŝi sciis pri ili - mi portis ilin el la laboratorio, bezonis ilin - tiam mi diris al ŝi kiel ili efikas. Mi ektimis kaj deziris reiri por preni ilin, sed mi pensis poste, ke mia konduto prezentiĝos tiel, kvazaŭ mi serioze traktus ŝiajn vortojn, kaj... mi lasis la aferon, sed la trian tagon mi tamen reiris, ĉar ne eltenis pro maltrankvilo. Jam... kiam mi venis, ŝi estis jam morta.

- Ho, vi senkulpa knabeto...

Mi eksaltis. Sed kiam mi rigardis lin, estis klare, ke li ne mokas. Mi kvazaŭ ekvidis lin por la unua fojo. Lia vizaĝo estis griza, neesprimebla laco kuŝis en la profundaj faltoj de la vangoj, li aspektis kiel homo grave malsana.

- Kial vi diras tion? - mi demandis kun stranga malkuraĝo.

- Tial, ke la historio estas tragika. Ne, ne - li haste aldonis vidante, ke mi moviĝis - vi daŭre ne komprenas. Certe vi rajtas tion profunde travivi, eĉ trovi vin murdinto, sed... ne tio malbonas pleje.

- Kion vi parolas! - mi diris rikane.

- Mi ĝojas, ke vi ne kredas min, vere. Tio, kio okazis, eble estas terura, sed plej terura estas tio, kio... ne okazis. Iam ajn.

- Mi ne komprenas... - mi diris feble. Vere mi komprenis nenion. Li kapjesis.

- Normala homo - li diris. - Kio estas normala homo? Ĉu tiu, kiu neniam faris ion abomenindan? Jes, sed ĉu li neniam ekpensis pri io tia? Aŭ eble eĉ se ne li ekpensis, sed io interne de li ekpensis, eksvarmis, dek aŭ tridek jarojn pli frue, eble li sukcesis defendi sin kontraŭ tio kaj forgesis, kaj ne timis tion, ĉar li sciis, ke li neniam realigus ion similan. Bone, kaj nun imagu, ke subite, en suna tago, inter aliaj homoj, li renkontas TION korpiginta, alĉenita al li, nedetruable, kion do? Kion do tiam vi havas?

Mi silentis.

- La Stacion - li diris mallaŭte. - Tiam vi havas la Stacion Solaris.

- Sed... kio, finfine, tio povas esti? - mi diris hezite. - Ja vi ne estas krimulo, nek Sartorius...

- Sed ja vi estas psikologo, Kelvin! - li interrompis min malpacience. - Kiu neniam havis tian sonĝon? Imagon? Pensu pri... fetiĉisto, kiu enamiĝis en, ni diru, malpuran subveston; kaj li, riskante sian haŭton, akiras ĉu donace, ĉu minace ĉi tiun plej karan, aĉan ĉifonon; tio devas aspekti amuze, ĉu ne? Kiu abomenas la objekton de sia

dezirego kaj samtempe pretas riski la vivon por ĝi, egala en siaj sentoj, eble, al Romeo kaj Julieta... Tiaj aferoj okazas. Sed vere, vi certe komprenas, ke devas ekzisti aferoj... situacioj... tiaj, ke neniu kuraĝis ilin efektiviĝi, ekster sia penso, en iu momento de konsterno, falo, frenezo, nomution laŭplaĉe. Kaj post tio la vorto enkarniĝas. Jen ĉio.

- Jen... ĉio - mi ripetis sence per obtuza voĉo. Muĝis en mia kapo. - Sed, sed la Stacio? Kiel tio rilatas al la Stacio?

- Vi certe ŝajnigas - li murmuris. Li rigardis min explore. - Ja mi senhalte parolas pri Solaris, nur pri Solaris, pri nenio alia. Mi ne kulpas, se ĉi tio draste diferencas de viaj atendoj. Cetere vi spertis jam sufiĉe por almenaŭ aŭskulti min ĝis la fino.

Ni ekiras la kosmon pretaj por ĉio, nome por soleco, lukto, martireco kaj morto. Modestaj, ni ne diras tion laŭte, sed foje ni opinias nin grandiozaj. Dume, dume tio ne sufiĉas, kaj nia preteco montriĝas nura pozo. Ni tute ne volas konkeri la kosmon, ni volas nur vastigi Teron ĝis la limoj de ĝi. Iuj planedoj estu dezertaj kiel Saharo, aliaj glaciaj kiel la polusoj aŭ tropikaj kiel la brazila ĝangalo. Ni estas humanaj kaj noblaj, celas ne konkeri aliajn rasojn, sed havigi al ili niajn valorojn por reciproke transpreni ilian heredaĵon. Ni trovas nin la kavaliroj de la sankta Kontakto. Jen la dua falso. Ni serĉas neniun krom homoj. Ni ne bezonas aliajn mondojn. Ni bezonas spegulojn. Ni ne scias kion fari kun aliaj mondoj. Sufiĉas unu, kaj ni sufokiĝas en ĝi. Ni deziras trovi la propran, idealigitan bildon; jen devas esti planedoj, civilizacioj pli perfektaj ol la nia; en aliaj, sekve, ni esperas trovi la bildon de nia primitiva pas-



inteco. Dume ĉe la alia flanko staras io, kion ni ne akceptas, kontraŭ kio ni defendas nin, kvankam de Tero ni ne alportis nur la distilaĵon de virtoj, heroan monumenton al la Homo! Ni venis tiaj, kiaj ni reale estas, sed kiam la alia flanko prezentas al ni ĉi veron – tiun parton de ĝi, pri kiu ni silentas – ni ne scipovas ĝin akcepti!

– Do, kio ĝi estas? – mi demandis, pacience aŭskultinte lin.

– Tio, kion ni deziris: kontakto kun alia civilizacio. Ni havas ĝin, la kontakton! Trograndigita, kvazaŭ sub mikroskopo, nia propra, monstra malbela, niaj klaŭnaĵo kaj honto!!!

En lia voĉo tremis furiozo.

– Sekve vi opinias, ke tion faras... la oceano? Ke ĝi? Sed kiucele? Por momento ni forgesu la mekanismon, sed, je Dia amo, por kio?! Ĉu vi serioze pensas, ke ĝi volas ludi kun ni? Aŭ puni nin?! Jen kio estas primitiva demonologio! Planedo regata de tre granda diablo, kiu por satigisian emon je satana humuro, al la membroj de scienca ekspedicio prezentas sukubojn! Vi ne povas kredi je tia kompleta idiotaĵo!

– Ĉi tiu diablo ne estas tiel stulta – li grumblis tradente. Mi rigardis lin surprizite. Venis al mi la ideo, ke li povis, finfine, havi nervan kolapson, eĉ se tion, kio okazis en la Stacio, ne klarigis frenezo. Reaktiva psikozo...? – trakuris la menson, kiam li komencis mallaŭte, preskaŭ senvoĉe ridi.

– Ĉu vi diagnozas pri mi? Atendu ankoraŭ. Principe vi spertis tion en tiel milda formo, ke vi plu scias nenion!

– Aha. La diablo min kompatis – mi ĵetis. La interparolo komencis tedi min.